



# TEA-BULTENO

13<sup>A</sup> JARO

MAJO - JUNIO 2010

NUMEROJ 5-6

Mem oni lernas vivi: ne ekzistas taŭgaj instruistoj.  
Mario Rigoni Stern (1921-2008)

## Karaj TEA-anoj kaj Gelegantoj!

Ĉifoje via informilo iom pli sin dediĉis al turisma-kultura temo: via redaktanto jam sentas, ĉirkaŭ si kaj en si, tiun vibradon ekscitan, anoncanta la libertempan periodon, dum kiu oni liberiĝas de la vintra mantelo, surmetas leĝeran veston printempan kaj vagadas, mense kaj kore, sur la plej allogaj padoj de Esperantujo, atende realigi sian plej aventuran vojaĝon al iu ajn renkontiĝo, ie ajn tra la mondo.

Suno pli ofte briletas en la ĉielo, plivarmiĝis la aero, eblas jam naĝeti en la maro: nu, ni ne ŝlosu nin hejme, sed ni eliru, ni vizitu nekonatajn kaj eĉ jam konatajn belaĵojn, kie ajn eblas, kaj, se diversaj cirkonstancoj malhelpas transiri la limojn de propraj urbo kaj provinco, kial ni ne malkovru tion, kio kaŝiĝas foje eĉ je du paŝoj de nia domo?

Kaj ĝuste pro tio ni iniciatis projekton "Koni Trieston!" cele la esploradon de en- kaj ekster-urbaj vidindaĵoj. Estas maniero, por ekscii iom pli pri loka historio, por plikleriĝi, por admiri naturajn aŭ arkitekturajn artaĵojn kaj, fine, ankaŭ por pasigi kelkajn horojn kune en bona etoso.

Je la 6<sup>a</sup> paĝo vi trovos la kalendaron pri maja kaj junia programoj: atente ĝin legu, decidu pri partopreno kaj, sekve, anoncu vin al prizorgantino Rosanna, ĉar nepras ke, por taŭga organizado, oni sciu kiom da personoj ĉeestos. Foje povas esti, ke, pro neantaŭviditaj kaŭzoj, programo estu ŝanĝita: ne koleru pro tio, ĉar certe la anstataŭaĵo estos same ĝuinda. Jen la telefon-numeroj de la kontaktenda persono: 040 43864; 340 3603291. La vizito de muzeo/ekspozicio okazos ankaŭ kaze de pluva vetero, dum la ekskurso ne. Kompreneble ni varme invitas ĉiun el vi kontribui al ĉi projekto kaj memoru, ke bonvenas viaj amikoj, amikoj de l'amikoj ... ktp!!!

Fine de majo-komence de julio okazos la "Karstaj Tagoj" (ĉi-sube vd. la detalojn), al kiuj ni varme invitas vin partopreni: estos bona okazo por pasigi kelkajn tagojn kun diverslandaj esperantistoj kaj ekskursi en nia bela karsta teritorio. Informiĝu pri kostoj ĉiam ĉe Rosanna.

## Triesto atendas vin, deziranta prezenti sian unikan teritorion

Ĉeftemo de tiu ĉi renkontiĝo estos la karsta medio: vi ekkonos ĝiajn plej sekretajn ecojn, vi flaros la parfumon de ĝia flaŭro laŭirante padojn nekonatajn al normalaj turistoj, vi enamiĝos en ĉi tiu eksterordinara naturo, kiu ŝajnas esti kruta kaj avara, sed male, grandanime, ĝi povas siajn trezorojn malkaŝi al tiuj kiuj kapablas ĝin ami kaj precipe respekti!

## Karstaj Tagoj 2010

**Vendredon la 28<sup>an</sup> de majo:** alveno de partoprenantoj, vespermanĝo kaj nokta promenado tra la urbo.

### Programo

**29, 30, 31 majo  
1 junio 2010**

### Sabaton la 29<sup>an</sup> de majo

Per la tramo al *Obelisco*: vizito subtera ĉe kampadejo *Obelisco*; promenado laŭ la *Napoleona vojo* ĝis Prosecco; tagmanĝo; reveno al urbo, mallonga itinero tra la urbo.

Vespere: koncerto en Salono Beethoven (Duo Aelia: Ines Gegprifti, Albanio – fortepiano; Egle Jarkova, Litovio – violono).

### Dimanĉon la 30<sup>an</sup> de majo

Ekskurso al *Basovizza* (Forsta Didaktika Natur-Centro), piedirado al karsta valo Rozandra, piknika tagmanĝo; rifuĝejo *Pre-muda* kaj vespermanĝo.

### Lundon la 31<sup>an</sup> de majo

Vizito de "Karsta Domo", fortikaĵo de *Monrupino*, "Turegoj de *Monrupino*"; tagmanĝo; promenado laŭ Pado Rilke kaj vizito de Kastelo en Duino. Libera vespermanĝo.

Vespere (21h00-21.h30) en *Prosecco*: "La stelbrila ĉielo de Triesto".

### Mardon la 1<sup>an</sup> de junio

Matene: Preĝejoj de Triesto; tagmanĝo kaj foriro.

Pluajn informojn petu rete al:  
[nored@tiscali.it](mailto:nored@tiscali.it) aŭ  
[testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)  
aŭ poŝte:

Triesta Esperanto-Asocio  
Via del Coroneo 15  
IT-34133 Trieste



# Projekto "Koni Trieston"

Maje kaj junie en programo du vizitoj: unue la Ŝtongravuraĵa Ĝardeno, sur la monteto San Giusto, kaj due la Botanika Ĝardeno, monteto San Luigi. Antaŭvide tion, jen koncize kaj skize kelkaj informoj pri ambaŭ.

LA ĜARDENO PRI ŜTONGRAVURAĴOJ estis starigita cele al kolektado de antikva materialo: epigrafoj, monumentoj, skulptaĵoj el romia, mezepoka kaj moderna periodoj, kaj inaŭgurita en la jaro 1843 en areo iam destinita por tombejo, kiu ĉe du flankoj estas limigita per la restaĵoj de la mezepokaj urbaj muregoj, kio faras el ĝi "vivanta muzeo". Ĝi estis planita de *Domenico Rossetti*, prokuratoro kaj historiisto, por konservi la plej antikvajn dokumentojn pri la historio de Triesto. Ĉe la supra parto estas konservitaj romiepokaj skulptaĵoj kaj surskriboj, el la urbo *Tergeste* kaj ĝia teritorio, el *Aquileia* kaj Istrio.

Inter tomboŝtonoj kaj romiaj monumentoj, videblas la t.n. "Templeto de *Winkelmann*", malgranda konstruaĵo simila al korintikstila eta templo, kiu entenas novklasikan cenotafion, skulptitan de *Antonio Bosa* (1833), kaj multnombrajn memorŝtonojn omaĝe al la fama germana arkeologo, murdita en 1768 en Trieste dum fia epizodo.

En la ĝardeno notindas, pro ties historia graveco, la bazo de monumento al *Lucio Fabio Severo* (2<sup>a</sup> jc pK), du fragmentoj de murskribaĵoj, atestantaj la ekkonstruon de la muregoj, ĉirkaŭontaj la urbon, fare de Oktavio Aŭgusto (32<sup>a</sup> j aK) kaj iuj tombomonumentoj.

La muzea sidejo, je novklasika arkitekturo, estis inaŭgurita en 1926 kaj tie estas ekspoziciitaj skulptaĵoj trovitaj dum elfosado de la romia teatro: statuoj de Apolono, Venuso, Minervo kaj portreto de *Quinto Petronio Modesto*. Salono estas dediĉita al Egiptujo kaj rememoras pri la kontaktoj inter Triesto kaj tiu lando tra la fluo de la 18<sup>a</sup> kaj 19<sup>a</sup> jarcentoj.

Unuaetaĝe, en sekcio pri prahistorio, rimarkeblas plurspecaj ŝtonaj kaj ostaj iloj kaj ceramikaĵoj trovitaj en grotoj kaj kavernoj de la karsta alt-ebeniĝo. En salono dediĉita al romia epoko, oni povas vidi diverstipajn materialojn venintajn plejparte el *Aquileia*. En la salono pri grekaj vazoj admireblas interesaj ekzempleroj korintikaj kaj atikaj el diversaj epokoj, donacitaj de la familio


*Fontana Sartorio*. La muzeo gardas ankaŭ raran amforon el arĝenta lameno, datitan ĉirkaŭ la jaro 400 aK.

## BOTANIKA ĜARDENO "MUZIO DE' TOMMASINI"

PLI OL 100-JARA, hodiaŭ ĝi ludas gravan rolon kiel unika artefarita oazo pri botanikaj biodiversecoj, pro konservado, kultivado kaj reproduktado de plantoj oficinaj, nutraj, teksumaj, de hortikulturaj varioj, tipe lokaj aŭ regionaj, aŭ el apudaj teritorioj, de akvaj kaj marĉaj kreskaĵoj, sukaj kaj kaktacaj. Starigita, jam en la aktuala areo, en 1846 kun funkcio de eksperimenta laboratorio cele al enradikigo de la aŭstra nigra pino en la karsta zono, pri ĝi ekokupiĝis la botanika apotekisto *Bartolomeo Biasoletto*, kiu translokigis ĉi tien ankaŭ rarajn speciojn devenantajn el alia Ĝardeno, de li fondita kaj estrita ekde 1828. En 1861 ĝin pliampleksigas *Muzio de' Tommasini*, internacie konata botanikisto kaj triesta komunumestro, per aldono de specioj specifaj el la Juliaj Alpoj kaj Istrio, strebe al establo de scienca instituto. En 1873 la komunuma regantaro decidis malfermi la Botanikan Ĝardenon al publiko: tiam videblis jam 254 diversaj plantoj. Post 4 jaroj estis eldonita la unua katalogo por ebligi interŝanĝadon de semoj el la pluraj reprezentitaj specioj, *Index Seminum* (Listo pri semoj), kies publikigo daŭros ĝis 1986.

La Ĝardeno iĝis urba institucio en 1903, kunligita kun la Naturhistoria Muzeo, tiam estrita de *Carlo de' Marchesetti*, disĉiplo de *Tommasini*, kiu ĝin maksimume evoluigis, ĝis atingo de la aktuala strukturo kaj scienca graveco. Sub estrado de aliaj kompetentaj direktoroj, en la postaj jaroj, estis aldonitaj novaj sektoroj: kurac-plantoj, rokmediaj kreskaĵoj, filikoj, sed en 1986 la Ĝardeno estis fermita al publiko pro financaj problemoj kaj nur en 1991 oni komencis la bezonatajn renovigajn laborojn kaj ankaŭ la eldonadon de *Index Seminum*, en kiu hodiaŭ enestas ankaŭ la kolekto de semoj el Botanika Ĝardeno *Carsiana*, en *Sgonico*.

Ekde 2001 parto de la ĝardeno estas vizitebla: en la lastaj jaroj oni prilaboris didaktitajn programojn taŭgajn por handikapitoj, kaj realigis ankaŭ itinerojn, ekipitajn per speciala materialo en brajla skribo, kunlabore kun la Instituto Rittmeyer, lernejo por vid-handikapitoj. Nuntempe la Urba Botanika Ĝardeno okupas pli ol unu hektaran areon kaj gastigas ĉirkaŭ milon de diversaj plantospecioj.



### Le Professeur :

*Mes Enfants... Utilisez agréablement vos loisirs en apprenant l'ESPÉRANTO!*

*Les services que cette langue auxiliaire peut vous rendre sont immenses.*

**On parle l'ESPÉRANTO dans tous les pays du monde**

Ĉi tiel oni propagandis Esperanton antaŭ... iom da jaroj! Komence de la pasinta jarcento (nu, ŝajnas jam en 1902!), en Francio abunde cirkuladis esperanto-temaj poŝtkartoj, propagandcelaj. Bele ornamitaj per grafikaĵoj, ilustraĵoj aŭ fotoj, kiuj rolis kiel mesaĝistoj pri vidindaĵo, evento, bondeziro aŭ aliaĵoj, tiuj kartoj vagadis tra la mondo dum jaroj kaj jaroj, kaj nuntempe ili estas celobjekto tre sopirata de kolekt-emuloj, kiuj - precipe se temas pri poŝte vojaĝ-intaj - klopodas ilin akiri, ofte retaŭkcie, kun espero malkovri ke tiu karto estis sendita/ricevita al/de iu fama esperantisto. Sed ne nur por tio iĝas akirenda iu karto: pli ofte allogas la bildo mem sur ĝi aperanta, kiel la ĉi apuda!

## Triesto kaŝita

### En placeto Santa Lucia



En 2009 oni komencis elfosadi, por konstrui aŭto-parkejon, en areo malantaŭ la episkopa Kurio (en kvartalo *Cavana*). Kaj tie aperis restaĵoj de romia vilao, tre gravaj laŭ scienca vidpunkto. Sekve de tio, oni ek-elfosis ankaŭ en iu proksima ĝardeno, kie oni trovis malnovajn tombojn de virinoj: fakte en tiu loko iam estis virina malsanulejo, kies plejparto estis ankaŭ sub la Kuria Palaco.

La vilao estis konstruita en la dua duono de la 1<sup>a</sup> jc pK, ekster la muregoj respublik-epokaj kaj apud Paleokristana Baziliko, kaj estis limigita de du gravaj voj-aksoj: unu estis tiu ĉemara, realigita post parta enterigo de la marbordo kaj direktiganta al Romia Teatro, dum la alia supreniris la monteton, laŭ la nuna strato Madono de l' Maro.

Du enirejoj malfermiĝis al ambaŭ stratoj. Ĉe unu el tiuj oni trovis diversajn aĵojn el bronzo, inter kiuj, tre interesa kaj bone konservita, virin-kapa sonorileto (*tintinnabulum*), plej probable prezentanta la diinon Minervo (vd. la *supran bildon*).

La vilao estis U-forma kaj, bedaŭrinde, la sudorientan alon, nome tiun rezidejan, eblas nur etparte vidi, ĉar ĝi estas kovrita de domoj, starigitaj en la 1960-aj jaroj.

Dek ejoj, kun survivantaj freskoj, alrigardis mozai-koriĉan arkadaron blank-nigran. La enireja halo, granddimensia, estis karakterizita per tre kompleksa motivo je blank-nigraj skvamoj; apude, troviĝis lokalo, kiun oni varmigus per varma aero, cirkulanta en interspaco sub la pavimo, ĉi lasta surmetita sur kolonetoj el terakoto.

En ĉiuj ejoj estis mozai-kaj pavimoj je blanka kampo, kun nigraj borderaĵoj: estis trovita ankaŭ

belega, dukolora mozaikaĵo, rondforma, kun trianguloj je grade malpliigantaj dimensioj direktigantaj al ties centro, videbla nur parte ĉar kaŝita sub aliaj pli novaj palacoj.

La konstruaĵo, fine de la 3<sup>a</sup> jc pK, estis detruita de furioza brulo, atakinta ĉiujn ejojn.

Ekde la 4<sup>a</sup> jc pK, tiu areo estis destinita al sepultejo, kio iĝas evidenta pro la eltrovo de ŝtonaj aŭ kavaĵaj tomboj, tre rara funebra konstruaĵo kaj sarkofagoj. Ĉi lastaj estis sur restaĵoj de fortika arĥitravo, eble elprenita el funebra monumento starigita je la duono de la 1<sup>a</sup> jc pK fare de la aŭgusta *seviro*\* *Publio Mercuseno* por la filo *Rufo*: denove malkovroj en tiu areo permesas ekkoni gravajn triestanojn, kiuj – en tiu 1<sup>a</sup> jarcento – malgraŭ sia probabla kelta deveno, plenumis prestiĝajn, regadajn oficojn en la urbo.

Tamen ankoraŭ multon oni devas labori por elterigi novajn kaj katalogi la jam elfositajn materialojn, konsistantajn ĉefe el tre fajnaj ceramikaĵoj, produktitaj nord-italie, probable en aŭgusta epoko. Krome indas memori, ke fine de la 1<sup>a</sup> jc aK kaj komence de la 1<sup>a</sup> pK (la muregoj, ĉirkaŭantaj tiam Trieston, estis starigitaj, en 33-32 j. aK, de Oktavio, ne ankoraŭ iĝinta imperiestro kun la titolo Aŭgusto) oni ree ekaranĝis la tutan suburban sektoron, kiu denove estis tute forviŝita per dua kompleksa interveno, celanta novajn konstruadojn ĉiam sur la sama zono.

Ĉi tiuj malkovroj, kiuj permesos pli profunde studi kaj kompreni la kompleksecon kaj gravecon de la diversaj konstru-fazoj en tiu fora epoko, estas aparte gravaj kaj valoraj laŭ scienca kaj kultura vidpunktoj, kaj espereble iun, tre proksiman tagon, la tuta urbanaro povos admiri la elfositaĵojn kaj viziti tiujn ejojn riĉajn je historio.

\* *seviro* – minora magistrato de antikva Romo, ĉefe honorotitolo. En municipaj urboj kutime tiun oficon plenumis la liberigitaj sklavo, riĉiĝintaj, kaj tial socie akiritaj pli altan rangon.

## Premio Giorgio Canuto per tesi di laurea in Interlinguistica ed Esperantologia

Si indice per l'a.a. 2009-2010 il concorso per la migliore tesi di laurea (triennale e specialistica) discussa in una università italiana negli ultimi tre anni accademici: il premio è dedicato al Prof. Giorgio Canuto, già magnifico Rettore dell'Università degli Studi di Parma dal 1950 al 1956 e Presidente del Movimento Internazionale Esperantista dal 1956 al 1960.

Al primo vincitore sarà assegnato un contributo di 150,00, € ed un riassunto del suo lavoro sarà ospitato, in forma di articolo, sulla rivista INKOJ. La giuria si riserva di valutare ulteriori lavori degni di pubblicazione, e trovare loro una degna collocazione.

La giuria è individuata nelle persone dei professori Fabrizio Pennacchietti, Università di Torino, Presidente; Davide ASTORI, Università di Parma, Segretario; Paolo Valore, Università Statale di Milano, Direttore di INKOJ.

La partecipazione è gratuita. Si concorre inviando una copia cartacea del lavoro a: Associazione Esperanto "G.Canuto", c/o Madella Oberrauch, via Prampolini 8, 43122 Parma e una digitalizzata a: [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it) entro il 15.07.2010. Per informazioni è possibile telefonare allo 0521 785582.

L'operato della giuria è inappellabile.

La premiazione è prevista per ottobre 2010.

Il premio è realizzato grazie al contributo della Itala Esperanto-Federacio

Federazione Esperantista Italiana, via Villaresi 38 20143 Milano. Tel.: 02 58100857; Posta elettronica: [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it)

informis Luigia Oberrauch Madella



## LA DIABLA DANCO

Lastatempe mi estas studanta la "Proverbaro Esperanta"-n, ordigitan de Camille Rogister kaj publikigita dum la jaro 1974 en la kolekto "Beletraj Kajeroj" ĉe Stafeto, la meritplena eldonejo de J. Régulo Pérez en La Laguna (Kanariaj insuloj). Tre fascina repertuaro de 2630 proverboj, sentencoj kaj dirmanieroj selektitaj el la origina kolekto, kiun Zamenhof aperigis en 1910.

En aparte interesa enkonduko, G. Waringhien koncize sciigas pri la historio de tiu verko. Fakte, ĝi estis komence aldono de la lingvo internacia al tiu "Paralela Rusa-Pola-Franca-Germana Frazologio aŭ Kolekto de proverboj, sentencoj kaj parolturnoj en tiuj kvar lingvoj", kiun la patro Marko de longe estis kunmetinta kaj per kajeroj eldoninta ekde 1905. La abrupta forpaso de la patro ĉesigis la aperigon de tiuj kajeroj, tamen Zamenhof, surbaze de la jam farita kolekto, kompletigis sian prilaboron kaj ĝin eldonigis en aparta volumo ĉe Hachette.

Traleante tiujn proverbojn, oni povas rimarki ĉeeston de multflankaj kulturoj kaj tre interese estus alveni al tiuj diversaj devenoj.

Probable hebrea estas, ekzemple, la origino de:

1311. *Liaj dentoj povas festi sabaton*  
(kapblas manĝi)

eĉ se specifa hebrea proverbaro ne ekzistas, ĉar liaj citaĵoj elvenas precipe el la SENTENCOJ de Salomono kaj la novelaro MISHNA.

Alia tre interesa proverbo estas:

1377. *Li pafis sin for* (subite forkuri),

kiu tute similas la anglan:

*To go off like a shot* (foriri kiel kuglo).

Ĉikaze eblas rimarki kiel diversiĝas la dirmanieroj en malsamaj kulturoj. Fakte oni diras itale:

*Darsela a gambe* (laŭvorte: doni sin al kruroj),  
aŭ *gambe in spalla* (kruroj surŝultre)

preskaŭ ekzakta traduko el la latina:

*In pedes se dare* (en la piedoj sin doni)

france:

*Couper a travers champs* (iri tra la kamparo)

hispane:

*Mostrar los talones* (montri la kalkanojn)

germane:

*Die Beine unter den Arm nehmen*  
(preni la krurojn sub la brako).

Tute trafis min la:

279. *Dancu diabloj, sed ne en mia arbaro.*

Kial?

Ĉar subite min pensigis pri tiuj nunaj polemikoj inter la italaj politikistoj pri ebla lokiĝo de la konstruontaj "Nukleaj centraloj". Ĉiuj diras, ke tiuj centraloj necesas pro la daŭra energia deficiito, pro la ŝarĝoj en la ŝtata bilanco, ĉar ni estas devigataj aĉeti energion, produktitan eĉ per atomcentraloj, de la najbaraj ŝtatoj (Francio, Kroatio). Ĉiuj ripetas, ke per la nuntempa tekniko tiuj centraloj estas tute sendanĝeraj, ktp, ktp, ktp, kiel nur la politikistoj kapblas senfine daŭrigi la polemikojn.

Sed ĉiuj estas konvinkitaj, ke tute danĝere estas loĝi proksime al tiuj centraloj. Eĉ se pri tiu ĉi timo, tute neracia, certe influas la memoro de la antaŭaj katastrofoj en Usono kaj Ukrainio, ĝi estigas grandan embarason al la ŝtata regado kiu ne povas definitive decidi pri la afero, ĉar neniu – de la Prezidantoj de Regiono ĝis la lasta civitano – inklinas akcepti la lokigon de tiuj "Centraloj" sur propra teritorio.

Ja ĝuste! *Dancu diabloj, sed ne en mia arbaro.*

Same pensiga estas la proverbo:

1729. *Ne puŝu vian regularon  
en fremdan anaron.*

Mia cerbo reiris al tiuj diskutoj pri la krucifiksa elmonro en la lerno- kaj juĝo-cambroj, pri la celebrado de kristanaj festoj ĉeeste de alireligianoj, pri la ĉadora surmeto ks.

Tralegu la "Proverbaro"-n.

Vi povas renkontiĝi kun pluraj, nuntempe tre taŭgaj, eldiroj.

### VIGLO

NdR: *kiuj interesiĝas pri la temo, havas eblon trovi ankaŭ en retejo plurajn ejojn pritraktantajn kaj listigantajn proverbojn, ĉefe elĉerpitajn el la Proverbaro Zamenhova. La plej lasta tie aperinta indas je vizito: temas pri [www.proverbaro.net](http://www.proverbaro.net), ellaborita de Rob Keetlaer (Nederlando).*

Ĉifoje nia amiko Viglo sendis itallingvan vortludon, kun kiu li renkontiĝis en iu revuo. Ĝi ne estas en esperanto, sed li certigas, ke ĝi rilatas ankaŭ al nia lingvo.

Ĉu vere?

METATESI \*

L'amore

capriccio, attenzione fervente

che tutta la mente sconvolge: passione.

Trasporto, calore: la vita

che pulsa infinita nel fondo del cuore.

*Il Troviere*



\**Metatesi—metatezo: estas vortludo en kiu, per delokado de unu litero de la unua vorto, formiĝas alia vorto, malsamsignifa.*

*Solve je la lasta bultena paĝo*

### Helpo de Dio

Josef estis tre malriĉa judo. Unu tagon li decidis turni sin rekte al Dio. Josef: "Dio?" Dio: "Jes, Josef." Josef: "Ĉu mi rajtas prezenti demandon?" Dio: "Kompreneble!" Josef: "Dio la Eternulo, kio estas por vi miliono da jaroj?" Dio: "Unu sekundo." Josef: "Kaj miliono da dolaroj?" Dio: "Unu cendo." Josef: "Dio, ĉu vi povas doni al mi unu cendon?" Dio: "Jes. Nur atendu dum sekundo."

*El la listo de Judaj Humoraĵoj*

**Kuriozaĵoj** Kien iri ĉijare? Ĉu al Francio, ĉu al Germanio, ĉu al Kroatio? Kiu ajn estas la elekto, nepre oni tranoktu en **HOTELO ESPERANTO!**

Kroatio



En Selce, situanta je 40 km sude de Rijeka ĉe la adriatika marbordo, eleganta florstila vilao, konstruita ĉirkaŭ antaŭ 100 jaroj, estis transformita al tre ĉarma hotelo "Esperanto".

Francio

*Hotel Esperanto, en la koro de Cannes, en trankvila zono, je nur 8 minutoj piede de la "Festivala Palaco", de la fama marbordo Croisette, de la plaĝoj. Kiom pli oni povus deziri?*



Germanio

En la Barokstila Fulda, ĉe la kvar-stela hotelo **ESPERANTO**, je 300 metroj de la ĉefa stacidomo, eblas spiri tutesperantan etoson: interesa la paĝo pri la filozofio de la hotela direkto. Tie oni propagandas esperanton!

Por ekscii iom pli, vizitu la jenajn ttt-ejojn:  
[www.hotel-esperanto.com/](http://www.hotel-esperanto.com/)  
[www.hotelesperanto.fr](http://www.hotelesperanto.fr)  
[www.kongresszentrum-fulda.com](http://www.kongresszentrum-fulda.com)

### Ekologie agadi

**Ekologia dentopasto: vi mem faru ĝin hejme!** Nepras konstanta uzado de dentopasto, por la sano de dentaro: do, kial ne prepari ĝin kaj, samtempe, ŝpari iom da mono? Jen recepto, tute ekologia, por hejme ĝin pretigi. Kio bezonatas? 4 kuleroj da glicerino (aĉetebla en apoteko); 7 da bikarbonato; duona kulero da maldika salo; 15 gutoj da esenca (vegetaĵa) oleo (mento aŭ alio, laŭ propra ŝato). Kunmiksi la tuton en taseto kaj poste ĝin konservu en eta ujo. La miksaĵo uzendas kiel normala dentopasto.

Spekteblas la videofilmo pri ties realigado, ĉe [www.focus.it/energeticambiente](http://www.focus.it/energeticambiente)  
**Trovita en la revuo "Focus-Aprilo 2010"**

### Ni helpu samideanon el Brazilo!

Benedicto Silva, 82-jara emerita instruisto, kolektas, ekde 1973, tradukojn de la libro "La eta Princeso", por kompara studo de tradukarto kaj aliaj kulturaj celoj. Li jam posedas ĝin en pli ol 90 idiomoj, sed ankoraŭ ne havas ĝin en la jenaj italaj dialektoj: tiuj bergama kaj sarda, dum en lia kolekto jam la bolonja, piemonta kaj friula versioj. S-ro Silva petas vian kunlaboron: kiu pretas lin helpi? Rekompence, li sendos la brazilan romanon "Tracema" de José de Alencar, de li tradukitan esperanten (2<sup>a</sup> eldono, 150 paĝoj).


Jen liaj kontaktadresoj:  
 rete: [benedictosilva@yahoo.com.br](mailto:benedictosilva@yahoo.com.br)  
 poŝte: C. P. 233 São José do Rio Preto  
 SP 15010-970 Brazilo

### Trovita!

Jen tre interesa propaganda poŝtkarto, eldonita de Achille Tellini, komence de 1900.

Lingua internazionale ausiliare  
 inventata da **L. L. Zamenhof**  
 Grammatik e vocabolario Esperanto  
 - Italiano - . . . . . traduko L. G. G.  
 Grammatik e vocabolario Esperanto  
 - Franciso - . . . . . traduko L. G. G.  
 Aussprache e racconti in Esperanto . . . . . traduko  
 de vokalitoj diferencoj . . . . . traduko  
 traduko de la publikacionoj in Esperanto ed.  
 A. TELLINI - BOLOGNA

Supre de la poŝtkarto, itallingve: *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio T.E.K.A. nombras pli ol 500 anojn en ĉiuj mondaj partoj, Membrigu. Petu la jarlibron por 1909 (1 libro) kaj senpagan ekzempleron de la monata organo "Voĉo de Kuracistoj" al S-ro H. F. Adolf Thalwitzer...*



Sed kiu estis Achille Tellini?

Li naskiĝis en Udine en 1866. 21-aĝa, li diplomigis pri Natursciencoj ĉe la Universitato de Torino kaj tuj poste iris al Romo kiel asistanto de geologia profesoro. Tie li laboregis en la sektoroj pri paleogeografio, glaciologio kaj romia geologio kaj publikigis serion da sciencaj eseoj. Destinata al elstara universitata kariero, tamen en 1893 pri ĉio li rezignis kaj preferis reiri al Udine, kie li ricevis la katedron pri Natursciencoj ĉe la Reĝa Teknika Instituto. En 1904, pro privataj kialoj, li forlasis instruadon kaj donacis sian riĉan scienca bibliotekon al la Respubliko S. Marino, dum al la Muzeo pri Naturhistorio en Triesto li transdonis trovaĵojn de sia scienc-vojaĝo farita en Eritreo.

Tiam li ekdediĉis sin al studado de romanĉaj filologio kaj literaturo kaj de Esperanto.

Esperantisto ekde 1901, li multon skribis kaj publikigis internacilingve. Li tradukis verkojn de S. Pellico, G. Rajberti kaj I. Nievo; kompilis la gvidlibron pri *Ravenna* kaj plenan E-Italan vortaron.

Fine de 1908 li translokiĝis al *Bologna*, kie, en la jaro 1912, li fondis la Italan Katedron de Esperanto, kiun li estris ĝis 1922, kaj Bolonjan grupon. Celoj de la Itala Katedro, laŭ liaj principoj, estis elekti taŭgajn instruistojn, organizi kursojn kaj ekzamenojn, propagandi pere de lecionoj kaj prelegoj. Lia agado, tiel diligenta kaj konstanta, ricevis la aproban konsenton, perletere, de Zamenhof mem (1914).

Li helpis la eldoniston Antonio Paolet el *San Vito al Tagliamento*, kiu interalie eldonis la italan organon "L'Esperanto". Dum la 1<sup>a</sup> mondmilito li peradis la korespondaĵojn inter la militkaptitoj, internigitoj kaj iliaj familioj.

En 1927 Tellini reiris al Udine kaj tie li komencis komparan studon inter la esperanta kaj friula leksikoj kaj, en 1935, publikigis esperantan gramatikon, kun vortaro kaj ekzercoj, por la romanĉoj de Friulo.

Oktobre 1938 prof-ro Achille Tellini, post longdaŭra kormalsano, mortis en Udine. Li, grandanime, testamentis duonon de siaj havaĵoj favore al Seminarioj en Udine kaj Gorizia, por ke oni starigu katedrojn pri esperanto kaj pri propagando de la friula dialekto.

*El la libro "Il movimento esperantista in Friuli" (Esperanto-movado en Friulo) de G. Martinez (Udine)*



## Supo laŭ la itala kuirmaniero

Printempas: la legomvendejoj plenas je bongustaj freŝaj legomoj, kaj jen la plej taŭga momento por pretigi specialan kaj bongustan kaj ĉefe sanigan supon! Kaj se vi posedas propran ĝardenon, kie vi zorgas pri verdaĵoj, nu des pli bone. Ju pli da diverspecaj legomoj vi kunkuiros, des pli bongustos la supo. Post finkuirado eblas aldoni ankaŭ pastaĵojn, aŭ rizon aŭ hordeon, dependas de viaj preferoj. Sed nun, ek al laboro!

### INGREDIENCOJ

- 2 terpomoj
- 2 karotoj
- 3 stangoj da celerio
- 2 kukurbetoj
- 100 g da pizoj
- 100 g da fazeoloj
- 2 poreoj
- 3 blankaj brasikfolioj
- 2 paprikoj
- 2 tomatoj
- 1 granda cepo
- 2 bulberoj de ajlo
- 1,5 l da vianda aŭ legoma aŭ kokina buljono
- 100 g da kuirita ŝinko aŭ fumaĵita viando (ekz. porkaj ripetoj...)
- 1 fasketo da drogherboj (laŭrofolio, petroselo, bazilio, timiano kaj rosmareno)
- 3 supkuleroj da oleo salo (k.b.)
- nigra pipro (k.b.)



### PREPARADO

Lavu, purigu kaj senŝeligu la legomojn. Ilin distranĉu, kiel same ankaŭ la kuiritan ŝinkon (aŭ fumaĵitan viandon), en pecetojn.

Haketu la grandan cepon kaj la ajlobulberojn en tre malgrandajn erojn. Varmigu la oleon en granda potoj kaj en ĝi fritetu la kuiritan ŝinkon (aŭ la fumaĵitan viandon) kune kun la trititaj cepoj kaj ajlo.

Brezu, daŭre miksante, unue la pli malmolajn legomojn dum ĉ. kvin minutoj, poste la pli molajn, dum pliaj 3 minutoj. Post tio enverŝu la varmegan buljonon.

Ekboligu la supon kaj en ĝin enmetu la fasketon da drogherboj aŭ - se vi preferas - spicu per la samaj sekaj spicaĵoj.

Lasu kuiri la supon dum 20 minutoj je eta flamo.

De tempo al tempo miksu la tuton kaj kontrolu la kuiritecon. Intertempe, en aparta ujo, kuiru la pastaĵojn (aŭ la rizon aŭ la hordeojn, laŭ via prefero).

Kvin minutojn antaŭ la kuiradfinon aldonu la viandon kaj pastaĵojn (aŭ la aliajn aldonajojn).

Elprenu je la fino la fasketon da drogherboj, spicu per salo kaj pipro, kaj garnu per petroselo. Kaj poste, kompreneble, ... bonan apetiton!

**Senpaga manĝo** Malriĉulo eniras restoracion kaj demandas la kelneron, kiom kosta rostita hepato. Kelnero: "150 zlotojn." Malriĉulo: "Kaj kiom kosta pano kaj saŭco?" Kelnero: "Tio estas senpaga." Malriĉulo: "Do, donu al mi nur panon kaj saŭcon!"

## Maja Programo

4 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
7 vendredo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj
8 sabato	Vizito de Ŝtongravuraĵa Ĝardeno - renkontiĝo je la 10 <sup>a</sup> horo antaŭ la muzeo, Via Cattedrale 15
8 sabato	18h00 - Salono Beethoven: Lezione musicale su musicisti e poeti triestini - Koncerto de Máté Gál, Giovanni Baldini kaj Elia Macrì
11 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
14 vendredo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj
18 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
21 vendredo	20h00 - Preparoj por Karstaj Tagoj
25 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
28 vendredo	20h00 - Renkontiĝo kun partoprenantoj en Karstaj Tagoj
29 sabato 30 dimanĉo 31 lundo	Komenciĝas la programo pri Karstaj Tagoj (vd. je la 1 <sup>a</sup> paĝo). Ĉiu ajn povas en ĝi partopreni, nur nepre oni devas sin anonci al Rosanna, por detaloj kaj kostoj.

## Junia Programo

1 mardo	Lasta programero de Karstaj tagoj
4 vendredo	20h00 - Projekciado de fotoj pri vojaĝo en Maroko (Anita)
5 sabato	Vizito de Botanika ĝardeno "Muzio de' Tommasini" - renkontiĝo je la 9h30 antaŭ la enirejo, Via C. de' Marchesetti, 2 (aŭtobuso 25-26)
8 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
11 vendredo	20h00 - Antaŭsomera Festo!

## Atentigo!

Ekde la 14<sup>a</sup> de junio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermata. Vin atingos kompreneble la TEA-Bulteno (monatoj julio-aŭgusto), sed atentu, kun ioma malfruo, ĉar la redaktanto estos en Mongolio ĝis komenco de julio. Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj - precipe - ĝuu Esperanton ie ajn tra la mondo!

SOLVO DE LA "METATEZO" PUBLIKIGITA JE 4<sup>A</sup> PAĜO:  
Mania → aniMa

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
**Redaktanto:** Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com  
**Sidejo:** Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21  
**Poŝta adreso:** Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio  
**Tel:** (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936  
**Reto:** esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it  
**Grupa ttt-ejo:** //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina  
**Poŝtĉekkonto** N° 10834349